

Heinrich Heine,  
Die Lorelei

Ich weiß nicht, was soll es bedeuten,  
daß ich so traurig bin;  
ein Märchen aus alten Zeiten,  
das kommt mir nicht aus dem Sinn.

Die Luft ist kühl und es dunkelt,  
und ruhig fließt der Rhein;  
der Gipfel des Berges funkelt  
im Abendsonnenschein.

Die schönste Jungfrau sitzt  
dort oben wunderbar,  
ihr goldnes Geschmeide blitzet,  
sie kämmt ihr goldenes Haar.

Sie kämmt es mit goldenem Kamme,  
und singt ein Lied dabei;  
das hat eine wundersame,  
gewaltige Melodei.

Den Schiffer im kleinen Schiffe  
ergreift es mit wildem Weh;  
er schaut nicht die Felsenriffe,  
er schaut nur hinauf in die Höh.

Ich glaube, die Wellen verschlingen  
am Ende Schiffer und Kahn;  
und das hat mit ihrem Singen  
die Lorelei getan.

...

Heinrich Heine,  
Lorelej

*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

Ne scias mi, kial subita  
malgaj' en la koro naskiĝis;  
el tempo jam enterigita  
legendo al mi reviviĝis.

Jam malvarmetiĝas l' aero,  
la Rejno mallaŭte babilas,  
per oro de l'sun' en vespero  
la supro de l' monto rebrilas.

Plej belan knabinon mi vi-  
das:  
en ora ornamo brilante,  
sur supro de l' monto ŝi si-  
das,  
la harojn mistere kombante.

La oran kombilon ŝi movas  
kaj kantas tra l' pura aero,  
kaj forto mirinda sin trovas  
en tiu ĉi kant' de l'vespero.

Ŝipet' iras sur la rivero,  
ŝipisto ektremis de l' kanto,  
kaj blinda por ĉiu danĝero  
rigardas li al la kantanto.

Ha, baldaŭ ŝipisto la bela  
perdiĝis sub l' akvoturnado;  
ĝin Lorelej' faris kruela,  
per sia mirinda kantado.

...

Heinrich Heine,  
Lorelay

*tradukita de Hans-Georg Kaiser*

Min kaptas malgaj' en la koro,  
pro kio tia trist'?  
Fabel' el antikva foro  
ne lasas de mi kun persist'.

Aere fridetas, trunkvilas,  
malhelas jam la Rejn'.  
La monto surprinte brilas  
vespere en rava scen'.

Tre ĉarma feino sidas,  
jen supre por ador';  
la ora ornamo ridas;  
si kombas harojn el or'.

Ŝi kombas per ora kombilo  
kaj kantas kun pasi';  
mirigas min la elbrilo  
kaj forto de l' melodi'.

Ŝipisto ŝipeton gvidas,  
lin kaptas ve' de ekzalt'.  
Li ja la rifojn ne vidas',  
li vidas nur supren sen halt'.

Mi kredas, ke ondoj tiras  
la ŝipon funden de l' Rejn';  
kaj tio de l' kant' eliras  
de Lorelaj-siren'.

...

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17), publikigita 1823.

Arg-2-2 (2014-04-23 18:09:02)

Aus dem Werk "Buch der Lieder", Kapitel "Die Heimkehr", Abschnitt II. Siehe auch ein [http://gutenberg.spiegel.de/de/?id=5&x=d=1131&kapitel=12&cHash=eb14eca2272#gb\\_found](http://gutenberg.spiegel.de/de/?id=5&x=d=1131&kapitel=12&cHash=eb14eca2272#gb_found).  
 Vidu ankaŭ: [http://www.gedichte.vu/?die\\_lorelei.html](http://www.gedichte.vu/?die_lorelei.html).  
 La melodion verkis la komponisto Friedrich Silcher. Vidu la retejon [http://www.lieder-archiv.de/die\\_lorelei-notenblatt\\_300493.html](http://www.lieder-archiv.de/die_lorelei-notenblatt_300493.html).

Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhof, \*1859-12-15 – †1917-04-14).

Arg-2-565 (2009-10-30 16:15:09)

Tiun ĉi tradukversiojn mi prenis el retejo <http://www.esperanto.mv.ru/Kolekto/Lorelej.html>.

Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, \*1954-05-21).

Arg-2-564 (2005-02-03 19:18:09)